Junulara Deklaracio de Gyeongju

66-a Internacia Konferenco de Neregistaraj Organizaĵoj de la Fako pri Publika Informado de Unuiĝintaj Nacioj: “Edukado por Tutmonda Civitaneco: Kune Atingi la Celojn por Daŭripova Evoluigo
Gyeongju, Korea Respubliko, 30 majo – 1 junio 2016

Ni, la junularaj partoprenantoj en la 66-a Internacia Konferenco de Neregistaraj Organizaĵoj de la Fako pri Publika Informado de Unuiĝintaj Nacioj, asertas, ke etoso de tutmonda civitaneco konsistigas la fundamenton por junulara agado en antaŭenigo kaj plenumo de la Celoj por Daŭripova Evoluigo de la Tagordo 2030.

Ni asertas, ke la fina celo de Edukado por Tutmonda Civitaneco estas antaŭenigi universalan partoprenon en la konstruo de prospera monda civilizo. Sekve, ni vokas al reekzamenado de la efikeco de junulara partopreno en ĉiuj niveloj de decidofarado.

Gejunuloj jam havas efikon en siaj komunumoj ĉiutage, en nekalkuleblaj manieroj kaj kun larĝe variaj celoj. Necesas ke niaj komunumoj internaciaj, naciaj kaj lokaj fortigu, subtenu kaj vastigu nian deziron kontribui al konstrua ŝanĝiĝo.

Integrigi gejunulojn en formalajn potencostrukturojn estas kompreneble avantaĝe pro diversaj kialoj. Sed simple trudi “junajn” voĉojn en “aĝajn” sistemojn, sen akompano de pli substancaj formoj de partoprenado, riskas degeneron en nuran simbolismon. Junaj homoj estas bezonataj kiel gvidantoj kaj decidofarantoj ne nur en junularaj forumoj kaj fakaj konsilioj, sed en tiuj spacoj kie la spuro kaj direkto de la socio estas decidataj. Tio ja povus postuli evoluigon de novaj sistemoj de decidofarado kaj kunlaborado – sistemoj karakterizataj de sentendenca serĉado de la vero, sinteno de kunlaboro kaj reciprokeco, kaj konscio pri la esenca rolo, kiun ĉiu individuo povas ludi en la plibonigo de la tuto.

Por esti efikaj tutmondaj civitanoj kaj plene kontribui al la atingo de la Celoj por Daŭripova Evoluigo (CDE), junaj homoj bezonas pli bonan aliron al bonkvalita kaj pagebla edukado, kiu kovras la tutan gamon de evoluo de homaj kapabloj, evoluigas kritikan rezonadon, inkluzivas la junularan diversecon, kaj konstruas la homan karakteron. Tamen, kvankam multaj nuntempaj eduksistemoj ne respondas al niaj evoluantaj bezonoj, ni rekonas, ke ni estas aktivaj iniciatantoj de ŝanĝiĝoj kaj povas multon kontribui al fortigo de edukprocezoj je ĉiuj niveloj.

Sekve, ni la junularo dediĉas nin al:

- Plenkore labori por realigi la Celojn por Daŭripova Evoluigo kaj povigi kreskantajn nombrojn de junuloj por aŭtentike kunagadi.
- Ligi niajn novigokapablojn por krei projektojn kiuj celas plibonigi altkvalitajn edukajn spertojn por junaj homoj.
- Regule raporti pri nia agado, pritaksi la efikecon de porjunularaj programoj, kaj honeste interkomuniki niajn lernajn atingojn kaj maltrafojn.
- Preni respondecon mentori unuj la aliajn tra edukprocezoj je la nivelo de supera edukado, kaj dividi inter ni okazojn por lerni.
- Konstrui fortajn intergeneraciajn partnerecojn kun Civilsociaj Organizaĵoj cele al komuna atingo de la CDE, precipe per fortigo de neformalaj edukaj iniciatoj.
- Proponi honestajn, trapensitajn kaj senpartiajn perspektivojn en la politikaj kaj decidofaraj procezoj, por la plibonigo de ĉiuj homoj, ne nur junuloj.
- Strebi postlasi la planedon en stato pli bona ol tiu en kiu ni trovis ĝin.

Ni alvokas al Membraj Ŝtatoj:

- Meti kreon de fortaj edukaj sistemoj kiel unuan prioritaton. Konsideri la enkondukon de universala, rigora normo de edukado, kiu entenas tajladon al la bezonoj de la loka kunteksto kaj edukadon por tutmonda civitaneco.
- Repripensi nunajn modelojn kaj strukturojn de junulara partopreno en decidofaraj procezoj je internacia, nacia kaj loka niveloj.
- Plenigi postenojn de Junularaj Delegitoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj, certigante ke ili respegulas diversecon, kaj ebligi ilian signifoplenan partoprenon kun la Konstantaj Misioj, UN-procezoj kaj Civilsociaj Organizaĵoj.
- Sin devigi al livero de rapida retkonekto al ĉiuj landoj de la mondo kaj subteni teknologian alfabetecon al ĉiuj personoj. Rekoni la ekaperon de elektronika lernado kiel legitima formo de edukado kaj kiel transnacia kvalifikaĵo.
- Subteni povigantan ĉirkaŭaĵon en kiu publikaj kaj privataj komunikmedioj povu liveri informojn faktobazitajn por eduki la enloĝantojn, ĉar la junularo estas la plej granda konsumanto de tiaj komunikmedioj.
- Helpi en la edukado de gepatroj kaj familioj, por konsciigi ilin pri la bezonoj de infanoj kaj junuloj, pri la graveco de edukado por ĉiuj, kaj ankaŭ pri la bezonoj de homa evoluo kiel ekzemple nutrado, higieno, kaj sanservoj.
- Ellabori kaj realigi efikajn kapablokonstruajn trejnprogramojn por edukistoj.
- Certigi, ke edukaj medioj rolu kiel lokoj de sekureco por ĉiuj junuloj, inkluzive en la transporto al kaj el edukaj institucioj.
- Instigi pli fortan komunikadon trans la terglobo, per realigo de multlingva klerigo.
- Elpaŝi unuaj por ekzempli tutmondan civitanecon per internaciaj politikoj, kaj por strebi al konstruo de interdependa tutmonda civilizo.

Oficejo de Universala Esperanto-Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041